

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ **Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E.** ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS  
Sokr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. La Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL  
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE  
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N-ROUEN

==== la n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====

+++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ  
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N° 147 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== DECEMBRO 1985 ====

+++++

## BILETO DE LA PREZIDANTO

Cet été, le Congrès Universel d' Esperanto a fait de la ville allemande d' Augsburg, une capitale mondiale. Depuis le premier congrès qui s' est tenu à Boulogne-sur-Mer en 1905, la tradition s' est maintenue et s' enrichit chaque année de participations d' hommes et de femmes de premier plan, riches de compétence dans les domaines divers de l' expérience et du progrès humain, ainsi que de ceux qui recherchent, dans ce vaste rassemblement international, des rencontres amicales, des relations et des échanges qui se poursuivront au fil des années à venir.

Bien qu' absolument neutre, le mouvement espérantiste est orienté naturellement vers ce qui élève l' homme, dans le respect d' autrui, de ses droits et de ses convictions, étendu à toute la communauté humaine au-delà des différences ethniques et culturelles.

De ces rencontres naissent des relations entre individus et entre groupements spécialisés de toutes natures, sur le plan culturel, artistique, technique, scientifique, ainsi se tissent, par dessus les frontières, des liens durables et fertiles.

Depuis bientôt cent ans, la langue de Zamenhof a fait ses preuves, et continue à les faire dans les cercles où elle est pratiquée, et en dépit des multiples obstacles que lui opposent l' inertie ou même l' hostilité de certains milieux, elle a atteint toutes les parties du monde civilisé. Pourtant, parmi ceux qui devraient être les premiers à en favoriser l' essor, et qui constituent le vaste marché des idées et de l' action sur le plan universel, et surtout les instances officielles internationales restent embarrassés dans la multiplicité des langues "de travail". Les médias, la presse écrite et parlée n' y font allusion que dans de rares circonstances exceptionnelles.

Notre association s' adresse particulièrement aux milieux chrétiens. Plusieurs de nos membres ont participé, durant la semaine précédant le congrès universel, à une rencontre oecuménique qui a eu lieu dans la même ville.

../...

Catholiques et protestants de 20 nationalités différentes ont ainsi vécu des moments de fraternité; ils ont prié et médité ensemble, selon la parole du Christ: "Là où deux ou trois sont réunis en mon nom, je suis au milieu d' eux".

Au cours de ces jours ont été évoqués d' importants projets de traduction et d' édition des livres qui forment la base de notre patrimoine religieux; ces travaux sont indispensables à la progression et à la reconnaissance de notre mouvement.

En effet, il ne suffit pas de proposer l' usage d' une langue aux institutions chrétiennes, mais il faut que les livres essentiels existent et se présentent dignement dans des traductions scientifiquement élaborées. De telles tâches supposent une compétence et des efforts de ceux qui les assument, mais aussi le soutien de ceux qui en ont compris l' importance.

R. Cl. COLAS

RESUMO

Dum la pasinta somero, la germana urbo AUGSBURG fariĝis kvazaŭ mondĉef-urbo, ĉar la Universala Esperanto Kongreso tie okazis, daŭrigante la tradicion naskiĝinta en Boulogne-sur-Mer en 1905. Ĉiujare, inter la partoprenantoj, homoj altnivele kleraj kunsidas en fakaj debatoj; dum aliaj pli modeste serĉas amikajn renkontojn, ligas daŭrajn rilatojn.

Nia komuna lingvo favoras la internaciajn kaj personajn konatecojn, en etoso de respekto, de spirita progreso, de pacemo, super la rasaj kaj kulturaj diversecoj.

Dum preskaŭ cent jaroj, Esperanto pruvis siajn eblecojn. Ĝi atingis ĉiujn partojn de la mondo, sed la inerteco, la baroj renkontitaj ĝenas ĝian disvastiĝon en la multajn internaciajn instancojn, kvankam ĝenatajn de la diverseco de la "laborlingvoj". Kaj la informaj rimedoj tre malofte dediĉas lokon al faktoj koncerne Esperanton.

Antaŭ la U.K. okazis en la sama urbo semajno ekumena: katolikoj kaj protestantoj el 20 nacioj travivadis kune tiujn tagojn en frata kristana etoso.

Projektoj por la traduko kaj eldono de la ĉefaj libroj estis planitaj, ĉar necesas, ke ekzistu en nia lingvo la bazaj verkoj, trezoro de nia kredo; sed nenio estos ebla sen la partopreno, la klopodoj kaj la subteno de ĉiuj.

R. C. C.

xx

PASTRO METZGER

En la regiono de Augsburg, ĉe la malgranda urbo Meitigen, la partoprenantoj de la ekumena kongreso vizitis la "Christkönigs-Institut" omaĝe al la fondinto, pastro Max Josef Metzger, kiu mortis en 1944 sub la hakilo de la nazia ekzekutisto. Arda pacamanto, pioniro de l' ekumenismo, li estis ankaŭ fervora esperantisto, partoprenante en gravaj publikaĵoj en la servo de la kredo en la kristana mondo. Forte kontraŭstarante la kriman agadon de l' nazis mo, li estis enkarcerigita de la Gestapo. En 1943, li estis mortkondamnita de "popola tribunalo".

Post prelego de nia amiko Walter Mudrak el Vieno, pri la vivo de tiu martiro, ni kune iris al la tombejo, ĉe la ŝtona tombo gravurita per liaj vortoj de ofero de sia tuta vivo: POR LA PACO DE LA MONDO KAJ LA UNUECO DE LA EKLEZIO.

R. C. C.

Preĝo de Max Josef Metzger

Patro nia en ĉielo!  
Etendu vian patran manon super la homaro  
de ĉiuj nacioj kaj lingvoj  
kaj unuigu ĉiujn en via filo  
kiel fratojn, kiuj en reciproka respekto  
sin estimas kaj amas.  
Renovigu en ni la inklinton  
por plenumi niajn farojn  
laŭ la vero, la justeco kaj la amo.

..//...



PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 20-a DE OKTOBRIO 1985

Ĉeestis: S-ino Michau, F-ino Preux, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue kaj Pons.

Petis senkulpigon: S-ino Vincent, P. Bourdon, F-to Marmou, S-ro Villeneuve ve.

Nacia kongreso en Angers: P. Goudé celebris meson; protestantoj partoprenis. FKEA-kongreso en St-Etienne kunigis 36 homojn; dank' al la laboro de S-ro Thiollière kaj liaj helpantoj, ĝi sukcesis en bona etoso.

La ekumena kongreso en Aŭgsburgo arigis 130 homojn; dum la posta UK okazis impona diservo, kun floruso el Munkeno.

Pilgrimo S-ta Francisko: 14 gejunuloj partoprenis sub gvidado de tri plenaĝuloj.

Banneux: Ĉeestis 30 esperantistoj el 5 landoj; P-roj Bourdon, Beckers kaj Müller kuncelbris eŭkaristion.

FKEA-kongreso 1986: apud Nantes de la 8-a ĝis la 11-a de majo. Temo: Aŭskultado de Kristo.

Bulteno: Ĝi kontentige aperas.

Espero Katolika iĝis pli valora.

Brazila Katolika Asocio proponas malmultekostan libron: "Dio estas amo".

Venonta kuŝido: 23-an de februaro 1986. Protokolis: J. Michau.

\*\*\*\*\*

KATOLIKA MEMBRARO

FKEA 1986: Bonfaranto: 1) S-ro BESSIERE (S-M); 2) S-ino GUILLOT (Oise)

Koran dankon!

IKUE 1985 (daŭrigo): 35) S-ino LAZARE; 36) F-ino SERVEL; 37) F-ino STUTZMANN; 38) FAIRBANK James; 39) VILLENEUVE G.; 40) LEEB F.; 41) BLOT L.; 42) BARADEL R.; 43) S-ino LEPOUTRE; 44) F-ino GOUDE; 45) DESPINEY R.; 46) DEGOUL F.; 47) S-ino LE CORGNE; 48) de ZILAH E.

IKUE 1986: 1) S-ino LE CORGNE; 2) de ZILAH E.

\*\*\*\*\*

LA HUNGARA PORCELANA FABRIKO EN HEREND

La hungara urbo Herend estas fama pro la starigo en la jaro 1826 de fabriko pere de Vince Stingl. Tamen pro financaj malfacilaĵoj, la fabriko baldaŭ fariĝis propraĵo de Mor Fischer, kiu decidis fabrikii nur porcelanaĵojn.

Post malfacilaj jaroj, la fabriko en Herend famkonatiĝis okaze de Universala Ekspozicio en Londono en 1851. Kelkajn jarojn poste, en 1865, la aŭstra imperiestro nobeligis Fischer, kiu fariĝis von Farkashazy.

Sed la afero bankrotis en 1874. Tamen en 1897, la fabriko denove funkciis kaj ĝia produktado ankoraŭ daŭras. Nuntempe la fabriko produktas pli ol 2000 artikloj; ĝi estas fama en la tutamondo.

Pluraj reĝoj aŭ princoj aĉetis teleraron en Herend, precipe Viktoria, reĝino de Britujo, Maksimiliano, imperiestro de Meksikio kaj Francisko-Jozefo I-a, imperiestro de Aŭstrujo. La nuna princo de Kimrujo ricevis teleraron de 85 eroj okaze de sia edziĝo.

(Laŭ Franklin magazine)

\*\*\*\*\*

HOMARANISMO REVIGLIĜAS

En julio 1985 fondiĝis la Homarana Asocio (HA), kiu volas studi, instrui kaj disvastigi la homaranismon, kiun Zamenhof karakterizis jene: "Lingvo internacia havas la celon, krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri". HA volas science trakti la homaranismon kiel "teknologion pri la konstruado de intelektaj kaj emociaj pontoj". HA deziras kunlabori kun ĉiaj esperantistoj kaj humanismaj organizaĵoj, ankaŭ kun UEA. Laŭ enketo ĵus farita de Info-Servo, minimume 30% de la esperantistoj interesiĝas pri homaranismo. Ili povas peti detalajn informojn de Homarana Asocio

Bismarckstr. 28, 3550 MARBURG F. R. G.

NOKTO SILENTA

Kiam venas Kristnaska vespero  
 kaj sur ĉielo aperas steloj,  
 tiam ekregas paco sur Tero  
 kaj eklumiĝas brilaj kandeloj.  
 Tra la fenestroj de urbaj domoj  
 la abioj videblas sennombraj,  
 tiam supozas kaj kredas la homoj,  
 ke anĝeloj eliras el ombroj.  
 Ili blovas arĝentan trumpeton  
 kaj anoncas al ni la misteron,  
 ke naskiĝis la eta knabeto,  
 kiu portis la savan esperon,  
 kiu ĉiujn pardonis kaj benis,  
 kies naskiĝon kristanoj festas.  
 Al mi ŝajnas, ke jaroj revenis,  
 kaj denove infano mi estas,  
 ke mi loĝas en la ligna domo  
 kun gepatroj kaj miaj fratetoj,  
 tiam certe sciis ĉiu homo,  
 ke nun plenumiĝos la petoj.  
 Subite la blankbarbulo venas -  
 sur la mantelo steloj, kometoj, -  
 li grandan sakon sur dorso tenas,  
 plenplenan de allogaj paketoj.  
 Pri koboldoj mi kredas sen dubo,  
 kiel kredi infanoj nur povas, -  
 ke ili venas tra kamentubo  
 kaj sub abio donacojn ŝovas.  
 Granda ĝojo plenigas la koron,  
 ne ekzistas plu ĝenoj kaj timo,  
 mi aŭdas milde kantantan ĥoron,  
 kaj regas paco en la animo.  
 La nokto sankta, nokto silenta!  
 Ĉiuj dormas en hejma trankvilo,  
 nur geedzoj en zorgo atenta  
 gardas ripozon de sia filo.

Ho, nokto sankta, nokto silenta!

Antonina APOLLO

Tallinn, 14/12/1984

IOM PRI LA AUTOROJ  
=====

S-iho APOLLO amatore pentras, ofte partoprenas ekspoziciojn kaj jam ricevis premiojn en tiu fako. Ŝi ankaŭ verkas poemojn kaj estis premiita okaze de la Balta Esperanto Tendaro (BET) 1985.

B. AUNIS partoprenis la ĉijaran belartan konkurson de UEA kaj ricevis la 2-an premion en la branĉo prozo. Lian ĉisupran poemon li dediĉis al Claude Ohresser, kies fileto Glenn mortis en la aĝo de 2 jaroj 1/2.

\*\*\*\*\*

ADMINISTRA ANGULO

La jenaj komitatanoj de FKEA finos sian mandaton en 1986: P-ro Degrelle, F-to Marmou, S-roj Pons kaj Villeneuve, kaj estas reelekteblaj.

Tamen, cele al konstanta renovigo de la komitato, pliaj kandidatoj estas bonvenaj. Sufiĉas esti ano de FKEA, kompreneble, kaj partopreni 4 (kvar) kunsidojn en la jaro, 3 en Paris kaj unu en la kongresa urbo. Neniu speciala laboro atendas vin, krom se vi deziras esti estrarano.

Bonvolu vin anonci al la sekretariino (v.p.1) antaŭ la fino de 1985.

PREGO DE UNU PATRINO

Mia Glennĉjo plu amata,  
 kie do vi estas nun?  
 Ĉu, anĝelo delikata,  
 vi flugetas sub la lun'?  
 Eble kun kamaradetoj  
 vi taŭzfaras al kometoj  
 kaj vi forgesetis min,  
 malproksima de Patrino.  
 Ludu, ludu, mia ido,  
 via estas la ĉiel',  
 laŭta sonu via rido,  
 mi ne volas esti brido  
 al la ĝojo de anĝel'.  
 Sed mi petas, iom honta:  
 je Kristnasko la venonta,  
 kiam kun anĝela ĥor'  
 vi alportos sur la teron  
 pacon, amon kaj esperon  
 por la bonvolula kor';  
 kiam ĉiuj familioj  
 gaje kantas ĉe abioj,  
 kiam sub la vintra vento  
 ĉio haltos en atent',  
 kiam sub kandelaj briloj  
 elpakiĝos la ludiloj;  
 kiam ploros mi sen bru'  
 antaŭ via eta ŝu',  
 kiam aliula ĝojo  
 min incitos kiel bojo;  
 ho, ne pensu nur pri vi,  
 zorgu iom nun pri mi:  
 se mi vokos vian nomon,  
 venu super mian domon  
 kaj al mi, en mia sol',  
 ĵetu iom da konsol',  
 mi eksentu ion varman  
 veni mian koron larman:  
 ia kiso, nur kiset',  
 jen por mi la sola pet',  
 filo, kiun Dio prenis.  
 Sed mi scios, ke vi venis.

Bernard AUNIS



FKEA-KONGRESO EN NANTES 8/11-an de MAJO 1986

\*

PERANTO: LAFARGUE Henri 6, allée Cassard 44000 NANTES Tel. 40 35 73 35

ALIĜKOTIZOJ: individuo 35 F; geedza paro 55 F; infano: ĝis 16-jara, blindulo, sacerdoto, religiul(in)o, alilandano, KELI-ano: senpage.

KONGRESEJO: Centre Spirituel des Naudières 31, rue de Naudières 44000 REZE  
Tel. 40 75 51 74.

PREZOJ: tranoktado kaj matenmanĝo 45 F (2-lita ĉambro)  
tagmanĝo 40 F vespermanĝo 35 F littukoj 15 F (por la tuta restado)

EKSKURSOJ: 1) duontaga - katedralo (XV-a j.) tombo de François II kaj Marguerite de Foix - kastelo - urbo - haveno (panoramo super la ŝipkonstruejo) - klarigoj pri la ekonomia vivo de Nantes (fare de la gvidisto) Prezo: 35 F.

2) tuttaga - la Brière (la nigra lando) - ebleco ŝipveturi al la insulo Fedrun - tagmanĝo - vizito de Guérande - la blanka lando (lando de salo) Saillé - Le Croisic - reveno tra La Baule - St-Nazaire (ponto)  
Prezo: 85 F (la tagmanĝo ne estas enkalkulita)

ALIĜILO (limdato 20-an de aprilo 1986)

sendota al S-ro H. LAFARGUE 6, allée Cassard 44000 NANTES  
(sur la ĉekoj, bonvolu indiki nur la sumon)

S-ro, S-ino, F-ino (1)

Adreso:

Naskiĝdato (nur por infanoj)

aliĝas al la kongreso laŭ la ĉi supraj kondiĉoj kaj pagas:

aliĝo	35 aŭ 55	.....
vespermanĝo 8-an de majo	35	.....
tranoktado 8/9	45	.....
tagmanĝo 9-an de majo	40	.....
vespermanĝo "	35	.....
tranoktado 9/10	45	.....
tagmanĝo 10-an de majo	40	.....
vespermanĝo "	35	;;;;..
tranoktado 10/11	45	.....
littukoj	15	.....
ekskurso a)	35	.....
ekskurso b)	85	.....

Sume

Mi deziras ... fervoja(j)n rabatilo(j)n

DATO

SUBSKRIBO

